

Numero: 246.
Novembro: 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Nebulaj pensoj

Antaŭ ol kaŝiĝi en la aŭtunaj, tristaj pensoj ni trarigardu la ĝisnunajn tagojn, kiuj forflugis super nia kapo.

Denove proksimiĝas la jarfino kaj nian koron invadas melankolio. Ni ne povas liberiĝi de ĝi. Ĉiam ĝi akompanas nin. Vane oni protestas liberiĝi de ĝi oni ne povas.

La aŭtuno alvenis kun frosta nebulo, kaj ĝi sidas ĉie, eĉ ankaŭ sur la etaj branĉoj de la arboj. La birdetoj de la arbaroj malgaje akceptas ĝin, kaj ili ĉesas plu triladi.

Ĉu vi ankoraŭ ne alkutimiĝis ĉi sezonon? Someraj noktoj pli bele muzikas en via memoro kaj vi revas pri ĝi. Vi furioze koleras, kial la mondo ne koleras vin.

Ĉiam vi nur trompiĝas kaj seniluziĝante vi staras kontraŭ viaj geamikoj. La esperoj forlasis vin eble por ĉiam. Vi ŝatus kriegi, sed vorto ne forlasis vian buŝon.

La tempo malrapide pasas. Kiel se plumbo retiregus viajn piedojn. La vivo estas amara kaj senespera. La larmogutoj malrapide trafluas sur via pala vango kaj ĝemoj senĉesaj torturas vian animon.

Ho, se via koro povus paroli, ĝi plendus malgaje kaj plorante, sed ĝi nur doloras vin kaj vi ne povas rifuĝi de la suferoj.

La nebulo malrapide iras inter la domoj elspiranta froston kaj glacian malvarmon. Neniu iras sur la stratoj. Nur inter la branĉoj de la arboj tremadas etaj birdoj atendante la sunbrilon, kiu alportos por ili varmon kaj belan vivon.

Sed pro nebulo la sunbrilo ne povas trarompi tiun ĉi malfablan mondon, kie ĉio mortis kaj neniam alvenos renaskiĝo.

Estus bone kredi, ke ĝi estas nur malbona sonĝo kaj post kelkaj horoj ni vekigiĝos. Denove ĉio estos bela kaj gaja. Sur la kampoj denove ekpompos floroj kaj ĉie birdoj pepados vigle.

Por ni restis nur espero, ke en iu tago la sufoka nebulo malaperos kaj en nia cerbo gajaj pensoj zigzagos ĉirkaŭbrakumante niajn homfratojn.

-Redaktanto-



La rolo de Esperanto en la bazlerneja lingvoinstruado

Kial oni lernas fremdajn lingvojn? Komence la respondo ŝajnas facila. Certe nun multaj homoj diras: tial oni lernas lingvojn, ĉar oni deziras komuniki kun fremdlingvanoj. Ni ne forgesu, tiu ĉi estas tre grava en nia vivo. Se ni estas eksterlande, post iom da tempo ni sentas sopiron paroli kun la lokaj homoj. Ne nur en vendejoj, restoracioj aŭ hoteloj estas bona, se ni povas komuniki en iu fremda lingvo. En iu lando, kies lingvon ni ne parolas, ofte sentas la mankon de lingvoscio. Dum la promenadoj en Romo, Londono aŭ en kiu ajn eksterlanda urbo ni ŝatus kompreni pri kio parolas la surstrata homo. Por niaj oreloj estas muziko la sono kaj ritmo de la loka lingvo. Eksterlande multaj homoj iom deziras fariĝi almenaŭ por kelkaj minutoj lokana.

Necese lerni fremdajn lingvojn. Tion grandparte scias ĉiu homo. Sed ellerni ĉiom da lingvoj ekzistantaj sur la terglobo estas neebla. La homa vivo estas tro mallonga ellerni ilin.

Restas fine la mondlingvoj. Ĉu oni povas ellerni ĉiun? Eble estas kelkaj talentaj homoj, kiuj estus kapablaj ellerni ilin dum longjara, laciga lernado, sed por milionoj da homoj ĝi ne estas solvo. La plej multaj homoj ne estas kapablaj ellerni perfekte almenaŭ unu lingvon. Se ne tiel estus, tiam post kelkjara, bazlerneja lernado de iu fremda lingvo la gelernantoj perfekte scius la elektitan lingvon. Bedaŭrinde la fakto estas tio, ke nur kelkaj gelernantoj sukcesas ellerni ĝin dum kvin aŭ kvar jaroj.

Estus bone, se jam, kiel lernejo oni ellernus iun fremdan lingvon kaj malfermiĝus la pordego al la mondo.

Multaj homoj komencas lerni lingvon pli aĝe, kiam estas mil aliaj taskoj. Krome en tiu aĝo jam la lernado estas pli malfacila.

Al ĉiu infano oni devus instrui iun lingvon por ke ili ne havu lingvajn malfacilaĵojn plenkreske kaj ili egalrajte povu orientiĝi eksterlande.

Amase oni devus rekoni la valoron de Esperanto en la lingvoinstruado en la lernejoj. Ĝis el la kapoj ne estos forviŝita la timo de tiu ĉi grandioza lingvo, nin torturos la ĥaoso; kiun lingvon instrui en bazlernejoj.

-Ŝaŝa-



Mateniĝo

La urbeto ankoraŭ dormis. Sur la stratoj nur kelkaj homoj rapidis al laborejo.

Malvarmeta vento trakuris super la tegmentoj de la domoj. En la aero ŝvebis matenaj odoroj. El la proksima drinkejo aŭdiĝis iom da bruo. La ĉiamgastoj ensuĉadis la ĉiumatendan glaseton da brando aŭ konjako. Ili dormeme preparolis la novaĵojn. En la malpura angulo de la ejo senhejmulo ripozis.

La drinkejstro jam plurfoje volis forigi lin, sed sensukcese, ĉar la gastoj defendis lin:

--Lali, lasu lin! Dum la tuta nokto li vagadis de strato al strato. La malfeliĉulo dormis neniom. Rigardu kiom lacega li estas. Iomete li dormetos ĉe la tablo kaj li foriros.

Je tio la drinkejstro paciĝis.

--Bone, sed poste li malaperu, ĉar lia odoraĉo fortimigas la gastojn.

--Mi garantias, ke li foriros.

Unu el la gastoj iris al la angulo kaj demandis de la senhejmulo:

--Joci, ĉu vi trinkas glaseton de brando?

La dormanta viro nur murmuris ion apenaŭ aŭdeble.

--Lali, donu glaseton da brando por Joci! Mi pagas.

La drinkejstro silente plenigis la glaseton per brando kaj ĝin li transdonis al la mendanto. Je la brandodoro la viro vekigis kaj elbuŝigis:

--Dankon.

Li tuj drinkis ĝin kaj dormis plu.

--Malfeliĉulo – diris la aliaj ridetante kaj ankaŭ ili trinkis la sian.

Ankoraŭ kelkajn minutojn ili babilis kaj unu post la alia ili komencis eliri el la drinkejo. Fine nur trioje ili restis tie, la drinkejstro, la viro, kiu mendis glaseton da brando por la senhejmulo kaj la dormulo en la angulo.

La drinkejstro ŝaltis la televidilon estantan sur la supro de ŝranko. Ili mute rigardis la matenajn novaĵojn.

Ie en la mondo denove estis sanga atenco, kiel ĉiam. Jam neniu interesis kiom da homoj mortas tage. Cent aŭ mil ne gravas. La homaro iĝis indifera.

Je la vortoj de la parolisto la senhejmulo malfermis siajn okulojn kaj ilin eklevis al la aparato. Li ekrigardis la ekranon stultete kaj neatendite li diris:

--Malfeliĉuloj. Dank' al Dio, ke ni vivas kaj ne ni mortis pro la bombo.

Pasis kelkaj sekundoj kaj malrapide liaj okuloj fermiĝis. Li dormis plu kaj eble li sonĝis pri bela hejmo.

Pri imaga vojaĝo

-Fantasta rakonto- IV.

Neatendite barono Bonfarulo ridetante demandis min:

--Ĉu vi timas?

Mi ne sciis tuj kion respondi. Certe li vidis sur mia mieno la timon. Vere mi ekprovis sekreti ĝin. Fine mi diris iom nerveze:

--Iomete jes. Por mi tiu ĉi situacio estas nekutima. Mi ne scias, kial esti tie ĉi. Kvazaŭ mi estus songanta.

Li ekridis amikeme.

--Ne timu! – li diris – Nenio malbono okazos al vi, eĉ vi havos agrablajn travivaĵojn ĉe ni.

Ekaŭdante tion mi iomete kuraĝiĝis.

--Kiam ni alvenos al tiu insulo?

--Matene vi ekvidos ĝin. Ĝis tiam restu trankvila kaj ĝuu la maran ŝipveturadon. En la ŝipo vi povas iri kien ajn. Neniu malhelpos vin en la libereco. La servistoj estas je via dispo. Nun mi devas paroli kun la kapitano de la ŝipo. Mi proponas al vi, promenu sur la ferdeko.



Kiam mi restis sola, denove min kaptis ĉagreno. Eble la grafo Bonfarulo nur volis trankviligi min, por ke mi faru nenian stultaĵon.

Malgraŭ tio mi obeis al lia propono, kaj komencis promenadi sur la ferdeko.

La freŝa aero estis agrabla kaj helpis aerumi mian carbon.

Unue mi timeme preteriris la maristojn kaj homojn, sed ili ĉiuj ridetis al mi kaj salutis min ekvidante.

--Bonan tagon sinjoro! – ili diris

--Estu salutate! –mi balbutis.

Kiam mi jam renkontis almanaŭ la dekan homon mi alkutimiĝis al ili kaj por mi ne estis ĝena ilia ĉeesto.

Vesperigis, kaj mi staris ĉe la barilo de la ŝipo kaj admiris la sunsubiron. La tuta maro estis ruĝa, kvazaŭ en la malproksimo estus giganta fajro kaj ĝi prilumis la milde ondumantan akvon. Mi estis tute ravita.

Tiam junulino alpaŝis kaj salutis min per sia velura voĉo:

--Bonan vesperon sinjoro!

(-daŭrigota-)

Poezio

Febrosongâ nokto

de Julio BAGHY

Kiam la nokt' bruligas stelomeĉojn
Kaj lunradian pompon prenas al si,
Sopiroj ludas sur la lir' arpeĝojn,
La koron sentoj vekas kanti, valsi ...

Aperas vi, ankora altarbildo,
La brakojn etendante voke al mi;
Al peksopiro venas ĉasta virto
Por fali kaj pagane psalmi ...

"Ah, venu ... venu! Vin mi vokas, pelas
Suferi pli la kor' ne povas plu jam.
Jen, vidu, via sklavo ekribelas;
Li volas havi vin aŭ morton tujan ...

Dum tikla sago de Amoro sorĉas,
Ni mordas nin per kis' por kison ĝajni.
Momentoj febraj rozoĉenon forĝas;
En ĝi pereas vi amata kaj mi ...

Sed jen la tag' estingas stelomeĉojn
Kaj vekas sin ĉagrenoj, zorgoj en ĝi;
Mutigas peza jugo la arpeĝojn
Por revteksadon de la koro -- venĝi ...



Poezio

Siberia lulkanto

Hirte flirte flugas haroj,
siblas vintra vent'...
Morde torde ŝiras koron
larmoj kaj la sent'...
Kant' patrina plore sonas,
dormas filo en lulil'...
Noktripozon por li donas
sono' infana en trankvil'...
"Baju, baju, bajuŝki...
Dormu sonĝe, dormu vi...
Ĝemo, ploro kaj dolor'
flugu for de via kor'!
Baju... baju... bajuŝki...
Dormu filo, dormu vi!"

Brue skue blekas vento,
knaras ligna dom'...
Ĝeme treme sin forkaŝas
besto kaj la hom'...
Vent' alportas sangan krion
tra l' glacia neĝa val'...
Lastaspire petas Dion
preĝ' de l' patro en batal'...
"Baju, baju, bajuŝki...
Ho, fileto, dormu vi...
Kri' de l' morto, son' de l' plor'
flugu for de via kor'!
Baju... baju... bajuŝki...
dormu filo, dormu vi!"

Prude krude fremdaj homoj
venas el insid'...
Trompe rompe sangtriumfe
venkas la perfid'...
Kant' patrina plore sonas,
dormas filo en lulil'...
Tran pacon por li donas
sort' de l' patro en trankvil'...
"Baju, baju, bajuŝki...
Koro mia, filo, vi...
Anĝelete, pala roz'
dormu pace en ripoz'!
Baju... baju... bajuŝki
dormu nur eterne vi!..."

Por infanoj

Oni ŝtelis Sunon

I

En iu matene la homoj time rimarkis, ke Suno estas forŝtelita. Ĝi ne ekaperis sur la firmamento, kiel ĉiutage. Vane oni atendis ĝin, la sunradioj ne orumis la tegmentojn de la domoj kaj ne forpelis la noktan malvarmon.

La homoj senkonsile staradis sur la strato kaj ili malgaje rigardis la ĉielon esperante, ke fine tamen ĝi ekaperos.

Bedaŭrinde Suno ne estis videbla. Baldaŭe disvastiĝis, ke iu ŝtelis ĝin.

Post kelkaj tagoj granda letero alvenis. La leterportisto apenaŭ povis transdoni ĝin al la urbestro.

Li ekscitite malfermis la koverton. En ĝi estis kolora foto pri la Suno kun teksto:

„MI ŜTELIS VIAN SUNON. SE VI DEZIRAS RERICEVI ĜIN, TIAM PAGU AL MI NAŬDEK NAŬ DIAMANTOJN ĜIS DIMANĈO. SE MI NE RICEVOS ĜIS LA DIFINITA TAGO LA DIAMANTOJN, TIAM PLURFOJE VI NE REVIDOS ĜIN KAJ ĜIAJ SUNRADIOJ NE VARMIGOS VIN. DO, KOLEKTU RAPIDE POR MI NAŬDEK NAŬ DIAMANTOJN!

NIGRA MANO”

La urbestro tre surpriziĝis leginte la strangan leteron. Li tuj alvokis la policistojn kaj dektektivojn. Li ordonis al ili tuj serĉi la ŝtelitan Sunon.

Ili senhezite ekiris por serĉi ĝin aŭ la ŝteliston. Ili traserĉis la tutan urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Ĝis vespero ili trovis nenion. Ili malgaje anoncis la novaĵon, ke Suno ne estas trovita. Preskaŭ ĉiu estis priaŭskultita en la urbo, sed neniu sciis, kie estas Suno?

La homoj ĉagrenis kaj ege timis pro ĝia malapero.

Pasis tagoj, sed Suno ne estis trovita. Jam ankaŭ la urbestro ĉagrenis. La policistoj kaj dektektivoj estis senkonsilaj. En la urbo ĉie estis ĥaoso. Dum la tuta tago estis malhelo, kvazaŭ estus nokto.



En la sekva kunsido de la urbestro la anoj vole ne vole interkonsentis, ke pagos la naŭdek naŭ diamantojn al Nigra Mano. Vere tio ĉi ege pezigos la kason de la urbo. Sed kion fari? La urbo ne povas esti sen Suno. Ili ne povas vivi en eterna mallumo.

Ili komencis vendi ĉiom da havaĵoj de la urbo kaj el la ricevita mono ili deziris aĉeti diamantojn.

La urbanoj ploris eĉ ploregis, ĉar ĉiu sciis, en la estonto ili vivos en malriĉeco.

En iu vespero maljunulo alvenis la urbon. Li tuj rimarkis la tombejan silenton kaj malĝojon en la urbo. Li demandis:

--Homoj, kial vi malĝojas?

Ili detale rakontis kio okazis kaj la maljunulo ekridis:

--Ĉu pro tio plori? Mi liberigos vin de Nigra Mano, se vi donas al mi tranoktejon kaj pladon da varma fazeolosupo.

--Tre volonte – diris la urbanoj – Liberigu nin de li! Kiel vi faros tion?

--Tio estu mia sekreto – respondis la maljunulo.



La virinoj tuj komencis kuir grandegan poton da fazenosupon. Apenaŭ pasis kelke da minutoj kaj inter la domoj flugadis ĝia eksterordinare bonega odoro. Ĝi estis kuirita kun longa kolbaso.

Kiam ĝi pretiĝis la maljunulo manĝis almenaŭ tri pladojn da fazenosupo kaj li diris kontente:

--Ĝi estis ege bongusta. Mi dankas al vi la bongustan vespermanĝon. Nun mi deziras enlitiĝi.

La urbanoj ekmiris, ĉar ili pensis, ke post la vespermanĝo li liberigos la urbon de Nigra Mano. La urbestro iomete tropiĝante diris al li:

--Kial vi ne tuj liberigos nin de Nigra Mano?

--Unue mi devas dormi por kolekti forton por la morgaŭa lukto. Ne timu, post la dormo mi liberigos vin de li. Montru al mi, kie mi dormos.

Lin enhejmigis vidvino, kies edzo mortis ĝuste antaŭ unu jaro. La maljunulo estis gvidita al la gastoĉambro kaj tie la virino faris por li komfortan liton.

--Bonan nokton! – diris la vidvino kaj lasis la maljunulon dormi.

Matene li vekigis gaje kaj forte. Kompreneble en la urbo ĉiam estis malhelo. Oni ne sciis, kiam estas tago, kiam estas nokto. Sed nun lin ne ĝenis tio, eĉ bonhumore li ekiris venki Nigran Manon.

(Daŭrigota)

-Onklo Adalberto-

Bildoj pri PAĈJO (Baghy Gyula)



La familio de Baghy



Strato Baghy Gyula



Baghy Gyula (Paĉjo) junaĝe



Lernolibro por hungaroj



La tombo de Paĉjo



Maljune